Espéranto Paris Île-de-France / Esperanto Parizo-Francilio

**Agadraporto 2024**

**ENHAVO**


**1. ADMINISTRADO................................................... 1**
1.1 Membraro........................................................1
1.2 Jarkunveno.................................................... 1
1.3 Komitataj kunvenoj..........................................2
1.4 Rilatoj kun Esperanto-France.......................... 2
1.5 Komunikado....................................................2
**2. AGADOJ...............................................................3**
2.1. Kunvenoj........................................................3
2.2. Informadaj eventoj......................................... 4
2.3. Instruado........................................................4


## 1. ADMINISTRADO

### 1.1 Membraro

| 2017 | 2017 | 2019 | 2020 | 2021 | 2022 | 2023 | 2024 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 120 | 161 | 156 | 94 | 85 | 115 | 117 | 105 |

### 1.2 Jarkunveno

La membro-kunveno 2024 okazis sabaton matene la 16-an de marto 2024, ekde la 10a matene, ĉeeste kaj rete per Google Meet. Entute 17 membroj partoprenis: 5 rete, 12 sideje. La prezidanto, Marc Giraud, malfermis la kunsidon je 10:10. Posttagmeze okazis distra programo, nome piediro al la Ĝardeno de la Plantoj (Jardin des plantes), aliborde de la Sejno. Vizito de la ĉefa konstruaĵo, la Granda Galerio de Evoluo.

La membroj povis voĉdoni rete per la retejo balotilo.org, krom 5 membroj sen retpoŝtadreso, kiuj povis voĉdoni poŝte. La celo de la baloto estis (mal)aprobi la agadraporton 2023-2024, la financan raporton 2023 kaj elekti novan komitaton. La 2 raportoj legeblas en nia retejo: esperanto.paris/membro-kunvenoj.

Ricevintoj de balotilo: 98 rete kaj 5 poŝte, entute 103.
Voĉdonintoj: 50 rete kaj 1 poŝte, entute 51.
Elcento de partopreno: 49,5 %

- Agadraporto: 45 aprobas, 0 ne aprobas, 6 sindetenas. Konklude: agadraporto aprobita.
- Financa raporto: 45 aprobas, 0 ne aprobas, 6 sindetenas. Konklude: financa raporto aprobita.

Elekto de nova komitato:
La komitato enhavu inter 9 kaj 15 membrojn. Cetere, la kandidato devas esti aprobita de almenaŭ la duono de la voĉdonintoj, tio estas ricevi almenaŭ 26 voĉojn.

Jen la nombroj de voĉoj ricevitaj de la 10 kandidatoj:

| Raymonde Coquisart | Pierre Gauthier | Didier Janot | Aleks Kadar | Aurélien Lestage | François Lo Jacomo | Didier Loison | Laure Patas d'Illiers | Sabrina Rusch | Guillaume Vera-Navas |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| RC | PG | DJ | AK | AL | FLJ | DL | LPI | SR | GVN |
| 42 voĉoj | 47 | 44 | 40 | 44 | 45 voĉoj | 47 | 45 | 43 | 42 voĉoj |
| ✅ | ✅ | ✅ | ✅ | ✅ | ✅ | ✅ | ✅ | ✅ | ✅ |

Konklude, ĉiuj kandidatoj estas elektitaj. Gratulon al la nova komitato
La nova komitato elektis en si mem novan estraron dum la komitatkunsido de la 22a de marto.

- Aleks Kadar, prezidanto - Didier Loison, kasisto - Pierre Gauthier, vic-kasisto kaj reprezentanto ĉe Esperanto-France  - Laure Patas d'Illiers, sekretario - Raymonde Coquisart, vic-sekretario kaj reprezentanto ĉe la lokaj kluboj. Ĉiuj mandatoj finiĝos dum la jarkunveno 2025

**1.3 Komitataj kunvenoj**
Inter la lasta jarkunsido kaj la venonta, la komitato kunsidis 5foje : 22/03 ; 12/06 ; 06/09;  06/12; 13/01.

**1.4 Rilatoj kun Esperanto-France**
Pierre Gauthier estas nia delegito ĉe la komitato de Esperanto-Francio. Diversaj bonvolemuloj de nia federacio helpas ĉe la Ĉerizejo pri diversaj taskoj. Pluraj franciliaj esperantistoj estas membroj de la komitato de Esperanto-France kaj partoprenas en la vivo de la landa asocio

**1.5 Komunikado**
La komunikado de la federacio unue disvolviĝas per la retejo esperanto.paris. Sekve kaj kaskade, la informoj estas publikigitaj en pluraj sociaj retoj. Por atingi pli rapidan kaj efikan rezulton ni starigis novan organizadon danke al respondeculoj pri diversaj taskoj :
• Retejo DJ https://esperanto.paris/
• Facebook DL GVN https://www.facebook.com/esperanto.paris
• X PG SR https://twitter.com/esperanto_paris
• Mastodono PG https://esperanto.masto.host/@esperantoparis
• Dissendolisto Amikaro LPI https://groups.google.com/g/amikaro-francilio
• Telegramo AL https://web.telegram.org/z/#-1081874369
• Amikumu LPI https://amikumu.com/
• Eventa Servo DJ AK https://eventaservo.org/o/Esperanto-Paris
• Vacapo: AK SR (Viktoro) https://chat.whatsapp.com/IjLHyHenBGDFOv8yPB2Xt3
• Dissendolisto de Paris Centre pri venontmonataj eventoj DL
• Instagramo AL. Precizigota.

## 2. AGADOJ

### 2.1. Kunvenoj

- **Kulturaj vesperoj** : (LPI) Kulturaj vesperoj okazis ĉiumonate lunde, de aprilo ĝis junio kaj de oktobro is la ĜA. Tiam okazis diversas aktivaĵoj, sekvitaj de kuna manĝo. Jen la temoj de la kulturaj vesperoj organizitaj dum la agadjaro: ludo "rava kadavro (25/03/2024); parolantaj ĉerizokukoj - Spektado de la muzikalo de TEJO "La sorto gvidos nin", kun ĉeesto de Duncan Charters (22/04), "dancantaj migdalkeksoj", babilado pri la ĵus okazinta eŭropa kongreso (13/05); spektado de la filmo "La forlasita virino", de Dankon Kwibe (14/10); la vojaĝoj de Lucien Peraire (18/11); la velŝipa kurado "Vendée Globe" per la virtuala ludo "Virtuala Regatta" (20/01/2025); origamio (10/02)

- **Esperanto-kafejoj** : La Esperanto-kafejo okazas ĉiumonate ĝenerale la duan sabaton. Estas okazo por Esperantistoj por renkonti kaj babili pri io ajn manĝante kaj trinkumante en bonetosaj lokoj. Komencantoj estas bonvenaj. Partoprenas inter 4 kaj 20-o da homoj. Dum la periodo ĝi okazis en: le Grand Cerf (13/04); Bacioni (18/05); Le Bichat (15/06); E-pikniko en parko Monceau (20/07); le Potager du marais 4e / Paralela Universo (17/08); Pizzou Aligre (21/09); Le Centenaire (19/10); Bistrot du Jardin 1er (09/11); Brasserie Madeleine 2e (14/12); Loup 1er (18/01/2025); La robe de la girafe (15/02).

- Kandidatiĝo al Conseil parisien des associations en oktobro. La lotumado okazis la 23an de oktobro. Mesaĝo ricevita de la urbodomo: ni ne estis elektitaj.

- Babilrondo de gejunuloj sabate (inter alie 14/12/2024, 11/01/2025, 08/02)

- **ZamFesto** (14/12/2024), 19 rue Traversière apud gare de Lyon, organizita de nia asocio kun la fervojistoj kaj la pariza grupo de SAT-Amikaro. La neesperantista fervojista dancistaro ne venis pro forpaso de ilia estrino. La resto de la programo kontentige okazis, interalie teatraĵo pri la vojaĝo de Lucien Péraire, surscenigita de Régis Fournier, kaj la spektaklo de la profesia esperanta muzikisto Armel Amiot, financita de la federacio.

- La **reĝkuka festo** okazis sabaton la 25an januaro, venis dudeko da homoj.

- Sabata posttagmeza **diskutrondo** (25/01/2025, 16/02), organizata de RC, pri diversaj temoj (ŝercoj, ZEO-j)

- **Esperanto 94** : Post la forpaso de la prezidantino Thérèse Sabatier la 22an de decembro 2023 estis lanĉita alvoko al elekto de nova komitato dum la sekva Ĝenerala Asembleo. La ĜA de La Verda Stelo Esperanto 94 okazis la 15an de junio 2024 en la sidejo de Choisy-le-Roi. Estis elektitaj: Prezidanto: Aurélien Lestage, Sekretario: Pierre Gauthier, Kasisto: Sylviane Lafargue, Vic-kasisto: François Lo Jacomo. La konsisto de la nova estraro estis deklarita al la prefektejo de Créteil fare de la sekretario kaj registrita la 30an de julio 2024.

### 2.2. Informadaj eventoj

- **Lucien Péraire**. Okazis dum la jaro pluraj eventoj honore al la juna perbicikla esperantista vojaĝanto.
  - ★ Ekspozicio okazis dum unu monato (17/04-17/05/2024) en Humathèque - Campus Condorcet en Aubervilliers, kie videblis la paneloj pri Lucien Peraire jam prezentitaj en 2023 en la stacidomo Versailles Chantiers.
  - ★ Simpozio pri Lucien Péraire (4/11) en École des Hautes Études en Sciences Sociales (EHESS). Tiuokaze la retejo de CNRS pri li (https://peraire.huma-num.fr/eo) estis oficiale malfermita.
  - ★ Kultura vespero (18/11)
  - ★ Teatraĵo dum la Zamenhof-Festo.
  - ★ Ĝisdatigo de la paĝo https://esperanto.paris/lucien-peraire

- **Foiro pri matematikaj ludoj (**23/05-26/05). Organizis FLJ AL Deĵoris Elisabeth Barbay (EB), FLJ, Lucien Bresler, Gérard, PG, Loïc Morvan, DL, Sarah, AL. La rezulto estas kontentiga. Estis sufiĉe da deĵorantoj, ni ne estu pli ol 3 samtempe. La evento plaĉis al la deĵorantoj: la publiko neniam malfavoris E-on kaj ĝenerale estis mense malfermata. Pli ol dek lernejaj grupoj antaŭmendis kaj ĉeestis po unu duonhoran prezenton de Esperanto, plejparte kun prizorgo de EB. Plejofte la lernejanoj sciis nenion pri Esperanto. Ni montris afiŝon pri Mundolingua kaj ili reciproke afiŝis pri ni, Mundolingua plu disponigos nian kalendaretojn.

- **Festo de asocioj de Paris Centre** (14/09), ĉe la urbodomo rue Eugène Spuller, la tutan tagon. Nia asocio havis budon. Deĵoris LPI, AK.

- **Homara Festo** (13-15/09), en Brétigny-sur-Orge. La budon pagis Espéranto-France. Organizis AL. Deĵoris AL, Guillaume, Lucien Bresler, Romain, Victor Simonnet, Laurent Vignaud...

- **Malfermaj pordoj** (21/09), dum la posttagmezo, en nia sidejo. Deĵoris LPI, PG...

- Unuhora **fulmkurso** (30/09), en nia sidejo. Gvidis DJ.

- **Salon de l'éducation** (15-17/11), en Parc des expositions, Parizo. Espéranto-France pagis por la budo Organizis PG. Deĵoris PG, LPI, Lucien Bresler, Jérôme Auclair, Laurent Vignaud, Sarah, Romain, Elisabeth Barbay.

- Intervjuo de PG (13/12/2024) dum **Bienvenue à l'Est**, elsendaĵo en la reta radio Arts Mada. La videaĵo spekteblas https://www.youtube.com/watch?v=yhd1NGFFis8 La intervjuo okazas proksimume ĉe la fino.

### 2.3. Instruado

De septembro 2024 nia federacio ofertas 3 kursojn:
- ĉeesta por komencantoj, jeudi de 19h00 à 20h30, PG (1-3 lernantoj)
- ĉeesta por mezniveluloj, mercredi de 18h30 à 20h, MP (4-5 lernantoj)
- ĉeesta por altnivelulo, mardi de 18h30 à 20h00, FLJ (2 lernantoj)